# RENASKIĜO

Finiĝinte la Granda Milito kaj forpasinte la Majstro Zamenhof, komenciĝis por la esperantista movado nova epoko tute malsama ol la antaŭa. Kadre de la ĝenerala normaliĝo de la mondaj aferoj normaliĝis ankaŭ ĉio koncerne al la esperantista movado. Reiĝis la ĉiujara okazado de universalaj kongresoj de Esperanto samkiel de landaj E-kongresoj kaj renkontiĝoj en diversaj lokoj en la mondo, kaj la (re)fondiĝo de grupoj kaj kluboj de Esperanto.

En ĉi tiu punkto decas iome atenti pri la ideologia ŝanĝo aŭ evoluo de la epoko. Tiel grava konflikto kia estis la MondMilito ne povis pasi ne lasante post si grandan efikon, aŭ pli ĝuste dirite, ĝi ne estus povinta okazi sen la antaŭekzisto de grava krizo ene de socisistemo. Ĉu kaŭzo aŭ rezulto de la Granda Milito, la krizo de la sistemo konsistis en tio ke la superreganta klaso, t.e. la burĝaro, ĉesis esti revolucia klaso kaj fariĝis konservema. Al tiu klaso apartenis revoluciaj kaj progresemaj homoj kiaj George Washington, Karl Marx, F. Engels, Lenin kaj multaj aliaj, inter ili Zamenhof mem. Tiu klaso batalis kontraŭ la antaŭaj superregantoj de la socio: la aristokrataro, la feŭdsistemo… Sed de tiam ĝi ne plu sin tenis favore al la socia progreso sed al la kapitalisma ekspluatado. Dume, aperis kaj prenis la torĉon de la progreso nova revolucia klaso kiu ĝis tiam ĝi neniam estis protagonisto de la historio: la proletaro. Ĝia debuto en la historio estis la Rusa Revolucio de 1917 kaj ĝia protagonismo estis granda laŭlonge la 20a jarcento. Tio perceptiĝis ankaŭ en la esperantista movado. Tiurilate menciindas ke en decembro de la jaro 1919 okazis en Madrido kongreso de la hispanaj Sindikatoj, kiu decidis disvastigi Esperanton kiel eble plej, kio signifis ke la lernejoj dependantaj de la Sindikatoj organizis kursojn de Esperanto en ĉiu hispana urbo kie ekzistis tiuj laboristaj centroj.

Rilate al nia urbo, ni jam vidis ke la E-grupoj enkadrigitaj en la Laborista Ateneo konsistis el aktivuloj kiuj ligis sian laboron por Esperanto kaj ties interna ideo kun sian dediĉon al la batalado por socia justeco. En tiu periodo, kiun ni pritemas, la E-grupo gvidata de Alfredo Villa eldonadis bultenon, nomatan “Diagonalo”, en kiu estis, en ĉiuj numeroj, krom artikoloj en Esperanto, ankaŭ gramatika suplemento de tiu Internacia Lingvo.

